

*Lian domon pasante, per unu okulo
Mi ekvidis panteron kun gulf' por kunulo.
La pantero englutis ja ĉion gluteblan,
Al la gufo lasante nenion manĝeblan.
La festeno finiĝis : al la gulf' li permesis
La kuleron empoŝi ; li mem ne forgesis
La tranĉilon enpaki virinan en mufon
Kaj per tio li ankaŭ distranĉis la — !*

En tiu momento la Falsa Kelonio malpacience interrompis ŝin :—

“Por kio utilas” li diris “ke vi eldiru tiajn versaĉojn, ne dume klarigante ilin ? Ĝi estas ja la plej konfuziga lingvaĵo kiun iam en la vivo mi aŭskultis.”

“Jes” konsente diris la Grifo “ankaŭ mi opinias ke estos bone ne plu daŭrigi tiun deklamaĵon.” Ankaŭ Alicio tre ĝoje konsentis.

“Ĉu vi volas ke ni tradancu la duan parton de la Omara Danco ?” proponis la Grifo “aŭ ĉu vi eble preferus ke la Falsa Kelonio kantu al vi ?”

“Ho, mi certe preferus la kanton, se la Falsa Kelonio komplezos.” Alicio respondis tiel fervore ke la Grifo diris, ofendite :

“H'm ! Pri gustoj ne utilas diskuti.” “Do, se agrable al vi, karulo, vi kantu por ŝi ‘Kelsonia Supo.’”

La Falsa Kelonio ekĝemis profunde, kaj kantis per voĉo iafoje plorsufokita :

*Supo alloga de verda kolor'
Preta je la sepa hor' !
De la vespero la ĉefa glori' !
Supo vespera, bela vi Sup' !
Supo vespera, bela vi Sup' !
Su-ŭpo ve-espera, Su-ŭpo ve-espera
Bela, ho bela vi Sup' !
Ho, bela Supo ! pli bona ol truf,
Ol sufo el bovada huf' !
Ĉion fordonus mi por suf—
—iĉe da vi, ho bela vi Sup' !
—iĉe da vi, ho, bela vi Sup' !
Su-ŭpo ve-espera, Su-ŭpo ve-espera
Bela, ho bela vi Sup' !
—VI SUP' !*

“Denove la horon” ekkriis la kiam la Falsa Kelonio nur komencis ĝin, de iu malproksima loko a ekkrio :—

“La proceso komenciĝas !”

“Vi rapidu do” kriis la Grifo apreninte ŝin per la mano, ĝi atentante la finon de la ĥoro.

Pri—kio—oni—pro—cesas ?” A kurado demandis spiregante ; sed kuris pli rapide. Dume sekvis ilin mallaŭte—la voĉo de la Falsa Kelonio per tre melankoliaj tonoj la rekantante

*Su-ŭpo ve-espera ! Supo ve-espera
Bela, ho bela vi Sup' !*